




la **Espero**



LA ESPERO
SVENSKA
ESPERANTOTIDNINGEN
FEBRUARI 1977

FONDITA EN 1913
ISSN 0014 0694




loroj monus
uado al tiel junaj infan
di por la angla. Por do
n la lerneja studobjekta
gi la studadon de la g
estas historio.
Nun la instruistoj fin
Skolvärlden, Lingua
iam aperis



Lingvopremio al Støp-Bowitz

Profesoro Carl Støp-Bowitz el Oslo ricevis la lingvopremion, kiun la pacasocio de Stockholm disdonis en decembro.

La pacasocio, *Stockholms Fredsförening*, disdonas sian premion ĉiun trian jaron. Laŭ la regularo, ĝin ricevas persono kiu faris meritoplenan laboron por antaŭenigi lingvon kiu servu kiel mondlingvo. Inter la pli fruaj premiitoj troviĝas multaj elstaraj svedaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Plej konataj eble estas la nomoj de Malmgren, Nylén, Dahl, Lapenna, Privat, Morariu, Strönne.



Profesoro Støp-Bowitz estas la 12a premiito. Li estas konata pro sia multflanka aktiveco en la esperanto-movado. Jam je la aĝo de 14 jaroj li konsciis pri la lingvaj problemoj, kaj eklernis esperanton per radiokurso. Depost tiam li funkcias ne nur kiel organizanto sed ankaŭ kiel sciencisto pri zoologio en la esperantolaboro. Li estas prezidanto de la Norvega Esperanto-Ligo kaj vicprezidanto de UEA. Kiel sciencisto li prelegis ĉe la Someraj Universitataj Kursoj kaj ĉe la Internacia Somera Universitato pri zoologio kaj ekologio.

La transdono de la premio okazis dum solena aranĝita de la pacasocio. La prezidanto de la asocio, Holger Eriksson, menciis ke la decido doni la premion al profesoro Støp-Bowitz estis unanima, kaj li ankaŭ iom rakontis pri la fonduso. Membro de la asocio, Anna-Greta Carlsson, rakontis memorojn pri la servistino Josefina Larsson, kiu ŝparadis el sia malalta salajro kun la celo starigi la fonduson. La ideon ŝi ekhavis dum ŝi servis ĉe la sekretario de Nobel.

Ulla Luin

JES & NE

Adreser till SEFs styrelse

I nummer 1 av *La Espero* brukar vi ha adresserna till SEFs styrelsemedlemmar. Här är dom:

Jan Strönne, ordförande
Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö
tel 040-12 92 11

Franko Luin, viceordförande
Myggdalsvägen 123,
135 00 Tyresö, tel. 08-712 82 91

Tomas Jansson, sekreterare
Studentstaden 15:235,
752 33 Uppsala, tel. 018-14 83 81

Sven Alexandersson, kassör
Krokvägen 85, 122 32 Enskede
tel. 08-49 80 24

Märtha Andréasson, vicesekr.
2265 Tolsered, 425 90 Hisings
Kärra, tel. 031-57 11 33

Ulla Luin
Myggdalsvägen 123,
135 00 Tyresö, tel. 08-712 82 91

Bertil Åkerberg
Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten
tel. 08-46 29 95

Roland Lindblom, suppleant
PI 3086, 140 40 Ösmo
tel. 0752-421 43

Gunnar Farm, suppleant
Vikingavägen 42, 852 46 Sundsvall,
tel. 060-17 06 65

Var inte rädd att ringa eller skriva till någon av dom, så fort du har något på hjärtat.

Denove kursoj en Helsingør

La aranĝantoj de la Internaciaj FERIAJ Kursoj en **Helsingør**, Danlando, petis nin informi, ke ankaŭ ĉijare okazos la tradiciaj kursoj, nome inter la 24a kaj 30a de julio.

Okazos elementa kaj konversacia kursoj, perfektiga studrondo kaj prepara kurso por

Friis-metodaj instruistoj. La tuta aranĝo kostas 925 dkr, se vi loĝos en du-persona ĉambro, kaj 1025 dkr, se vi loĝos en unu-persona ĉambro. Tiu kosto inkluzivas kurskotizon, loĝadon kaj tri manĝojn ĉiutage. Pliajn informojn vi povas ricevi ĉe Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør, Danlando. Informu pri tiu ĉi ebleco lerni esperanton viajn amikojn kaj kursanojn!

Brevmärken om Island-kongressen

Som alltid har även årets UK tryckt vackra brevmärken som du kan sätta på dina brev och vykort. En karta med tio brevmärken kostar 1:75, tre kartor 4:—.

Du beställer enkelt genom att sätta in det rätta antalet kronor på postgiro 14 74 29 - 5 (Svenska Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö). Du glömmar inte att anteckna vad betalningen gäller!

... och kongressen i Falköping

Även för att påminna om SEFs årskongress, som kommer att äga rum i Falköping, finns det ett brevmärke (se bilden här intill). Det säljs av kongressarrangören, dvs. Falköpings Esperantoklubb.

Dessa brevmärken är billiga: de kostar bara 1 krona per 10, plus 1 krona för porto. Om du sätter 10 kronor på postgiro 66 78 61 - 9, Falköpings Esperantoklubb, får du sålunda 90 brevmärken. Sätter du in fler kronor blir det ännu fler! Enkelt, eller hur?

Internacia amikeco

Inter la 20a kaj 26a de februaro ni festos denove *Semajnon de internacia amikeco*, kaj certe ĉiuj kluboj jam aranĝas ion por tiu okazo.



Estas eble strange, ke movado kiel nia, kiu ekzistas *por* internacia amikeco, bezonu krome ankaŭ specialan semajnon por festi tion. Ni eble ne bezonas tian semajnon, sed la esperantomovado lanĉis ĝin, por ke ankaŭ homoj ekster nia movado, almenaŭ unu fojon jare, pensu pri la mondo kaj la homoj ekster sia propra urbo, ekster sia propra lando. Tial estas tre oportune igi ankaŭ aliajn asociojn kaj homojn festi kun ni.



Klubo kun propra kanto

La Guto, esperantoklubo en Ljungby, havas propran kanzonon, kiun oni komune kantas dum la kunvenoj.

Ni publikigas tie ĉi la kanzonon de ĝi. Vi certe povas ricevi la tutan tekston ĉe la klubo.

*Ni venas al esperantkunven',
falera,
ni venas el urbo kaj bien',
falera,
ni venas por paroli
kaj por legi kaj kontroli
nian scion en la lingva fenomen'
falera.*

La vortojn skribis Malte Markheden.

Esperantoförbundets sekretariat
kommer i fortsättningen
att ha öppet **tisdagar** mellan
18 och 20. Vi börjar med
tisdagsjouren den **15 februari**.



La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansv. utgivare: Bertil Åkerberg
Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping

Telefon: 0510 - 286 42 (arb. 0510 - 221 30)

I redaktionen: Anita Lindblom, Franko Luin, Geoffrey Sutton
Prenumeration: 30 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Svenska Esperantoförbundet

Tidningen utkommer med 8 nr per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden

Fotosats: Esperantoförbundet
Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1977



Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Hägervägen 31
Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets sekretariat är öppet tisdagar kl. 18 — 20.

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift: direktansluten medlem 30 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 15 kronor, familjemedlem utan tidning 10 kronor

Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperantonytt* ingår i medlemsavgiften.



Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö
Besöksadress: Möllevångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition: Anna-Greta Strönnne

Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

Reklampoŝtkartoj en sveda lingvo

Ĉu vi scias, ke SEF havas kelkajn reklampoŝtkartojn svedlingvaj, kiujn vi facile povus utiligi, se vi bezonas sendi nur mallongan mesaĝon al viaj konatoj aŭ nekonatoj?

Por tiuj, kiuj kutimas viziti la svedajn esperanto-kongresojn tio ĉi ne estas novaĵo, ĉar eblis kelkfoje aĉeti la poŝtkartojn ĉe la librostando. La motivo de la poŝtkartoj ankaŭ ne estas tute nekonata.

SEF havas nur malgrandan stokon da ili. Se vi havas eblecon utiligi ilin, bonvolu mendi per enpago rekte al la poŝtgira konto de SEF (20 12 - 3). La kartoj kostas 10 kr po 20 (po 10 de ĉiu speco).

Vi bezonas nur enpagi 10, 20, 30 ... kr kaj noti sur la pagilo «poŝtkartoj» kaj ili venos. Cetero: kial ne mendi ilin por la tuta klubo kaj vendi ilin al viaj samklubanoj?



Rotaria asocio

En 1975 fondiĝis en Kopenhago *Rotaria Asocio de Esperantistoj*. Nun ĝi intencas plivastigisian agadon en internaciaj kaj naciaj rondoj.

Ĉar ne ankoraŭ ekzistas sveda sekcio de RAde, oni esploras la eblecon organizi ĝin. Unuavice estus interese scii, ĉu ekzistas rotarianoj inter la svedaj esperantistoj, due, ĉu ekzistas intereso inter ili pri speciala sekcio.

Karl Söderberg, Luthagsplanaden 15 A, 752 25 Uppsala, pretas doni al vi pli da informoj pri tiu ĉi demando.

Denove limeriko

Ni finas tiun ĉi rubrikon ankaŭ ĉifoje per limeriko, sendita al *La Espero* de Geoffrey Sutton:

*Estis juna in' el Hästveda,
kiu evidentigis graveda.
Ŝi diris kun ploro,
ke kulpis pastoro
aŭ eble Esp.-klubo merkreda.*



Ĉu ekmalfluso por la angla?

Jam de jaroj oni parolas pri internaciigo de la edukado, sed spite al ĉi tio la aŭtoritatoj samtempe pli kaj pli intensigas instruadon de nur la angla lingvo — ofte en la nomo de internaciigo. En 1968 oni decidis devige instrui la anglan al svedaj infanoj ekde la tria klaso (9-jaraj infanoj), anstataŭ kiel antaŭe en la kvara klaso. Jam tiam pluraj esploroj montris la negativan efikon de ĉi tia instruado al tiel junaj infanoj, sed ĉio ŝajne devas cedi por la angla. Por doni lokon al pli de la angla en la lerneja studobjektaro, oni ne hezitis mallongigi la studadon de la gepatra lingvo. Ĉio ĉi jam estas historio.

Nun la instruistoj fine ekprotestas. En la gazetoj Skolvärlden, Lingua n-roj 2-3-4/75 kaj Lärartidningen jam aperis artikoloj atakantaj tro fruan lernadon de fremda lingvo. Instruistoj en Linköping en aŭtuno 1976 organizis sin kaj elsendis plurpaĝan stencilafon kun la titolo Mortigo de la angla en la 3-a klaso — ĉi tie ripozas eraro. La celo estis enurbe kolekti subskribojn de instruistoj por prezenti al la lernejoj aŭtoritatoj antaŭ la superrigardo de la porlerneja studplano.

Estas pruvite, ke la infanoj suferas de la nuna situacio, sed ni tamen ne atendu baldaŭan plibonigon, ĉar tiel la aŭtoritatoj devas konfesi eraron. Sed la malkontento restos kaj fine turnos la tajdon. Ĝuste en tiu ĉi malkontento koncerne la malkaltan stadion en la lernejoj, kaj en malkontento pri ĉiu alia aspekto de la nuna unuflanka lingva kaj kultura politiko, kuŝas nekalkuleble potenca energifonto por la sveda esperanto-movado. Malkontentuloj serĉas novajn vojojn. Nur nia solvo estas kaj praktika kaj bazita sur egaleco en internaciaj kontaktoj. Restas por ni ĉiuj ĝuste informi la malkontentulojn!

Geoffrey Sutton

Kulturella beroenden: en gång till

Här fortsätter brevväxlingen om *Sveriges internationella villkor*, först R Johanssons svar inom ramen, sedan G Sutttons kommentar, båda något förkortade.

«Jag medger /.../ att innehållet i de verk som upptas i rapportens källförteckning är viktigare än vilka språk de är författade på.

Om du får tillfälle att korrigera det missvisande intrycket i rapporten, att esperantorörelsen skulle dela Meads tankegångar om ett världsspråk, vore vi tacksamma.

Det måste betonas, att språken inte nödvändigtvis kan vara likställda. Utgångspunkten är att *människorna* är jämlika. I FNs konventioner om de mänskliga rättigheterna sägs: «*Konventionsstaterna förpliktar sig att garantera, att de i denna konvention inskrivna rättigheterna får utövas utan åtskillnad av något slag på grund av ras, hudfärg, kön, språk ...*». Beträffande språk och kultur kan rättigheterna i konventionen inte förverkligas utan esperanto som andra språk.

Angående dina anmärkningar om kulturimperialism vill jag påpeka att graden av «eurocentrism» i esperantos kultur är nästan helt beroende av de esperantotalandes sammansättning. Japan har idag en rörelse lika stark som vilket europeiskt förbund som helst, och Kinesiska Esperantoförbundet har goda utsikter. Andra förbund i Asien och Afrika är förhållandevis svaga på grund av dessa länders ekonomiska läge. Esperanto utvecklas som alla andra språk och särskilt japanska författare har inte haft något litet inflytande i esperantos originallitteratur.

Jag instämmer helt i din bedömning, att utvecklingen på det språkliga området kommer att bestå av två motstridiga tendenser. Detta har länge uppmärksammats av esperantorörelsen. Å ena sidan förstärks engelskans ställning, men å andra sidan hävdas de egna nationella språkens ställning. Detta hävdande av de något mindre nationella språken görs med krav på jämlikhet. Men det finns en naturlig gräns för det praktiska förverkligandet av dessa fullt berättigade krav. De svagare och mindre kan inte hävda sina rättigheter på grund av mindre makt och mindre ekonomiska möjligheter. Den enda praktiska och demokratiska utvägen är alltså ett neutralt språk. De två tendenserna pekar direkt på esperanto. Hur lång tid utvecklingen kommer att ta kan man naturligtvis tvista om».

Geoffrey Sutton

«Det torde /.../ vara viktigare att granska *innehållet* i de verk, som finns i rapportens litteraturlista och som delvis ligger till grund för framställningen i rapporten, än att inrikta sig på vilket språk dessa verk är skrivna på. Jag har strävat efter att i möjligaste mån låta olika åsiktsriktningar, olika infallsvinklar och olika kulturkretsar komma till tals i rapporten. Med tanke på språkstrukturen i dagens värld och den dominans, som de västeuropeiska språken, företrädesvis engelskan, faktiskt har, kommer många av de verk, som är relevanta för en sådan framställning som min rapport, att vara avfattade på i första hand engelska. Många av den västerländska «kulturimperialismens» kritiker från staterna i Tredje och Fjärde Världen är t.ex. av omständigheterna tvingade att skriva på engelska. Under sådana förhållanden förefaller det knappast hållbart att hävda att språken i de verk, som är representerade i litteraturlistan, säger något om rapportens inriktning.

I Esperantoförbundets skrivelse riktas det kritik mot min rapport, därför att jag inte förstått innebörden av planspråksidén. Detta påstående underbyggs med en hänvisning till sid. 101 i rapporten och formuleras så här: «Det skrivs att esperanto är ett försök att 'göra slut på motsättningarna nationerna emellan' genom skapandet av 'en verklig global kultur'». Dessa citat från sid. 101 i min rapport bör ses i sitt sammanhang. Jag har på det angivna stället fört en diskussion om det intrikata förhållandet mellan språk, kultur, nationalitet och nationella konflikter. Detta utgör ett problemkomplex, som ofta gör sig påmint i den internationella utvecklingen t ex då detta skrives i förhållandet mellan fransktalande och engelsktalande kanadensare. De principiella resonemang jag försökt föra i rapporten avslutar jag med en hänvisning till att åtskilliga personer och då bland annat den kända kulturantropologen Margaret Mead hävdade att «förutsättningen för att få fram en verkligt global kultur och göra slut på motsättningarna nationerna emellan skulle vara ett världsspråk». Jag fortsätter sedan genom att påpeka att olika försök gjorts att skapa ett «världsspråk» genom «för ändamålet konstruerade språk som esperanto och ido».

Vid den förnyade genomläsningen av detta avsnitt av rapporten kan jag emellertid förstå, att texten möjligen kan tolkas så att förespråkarna för esperanto, ido och andra planspråk uppfattas som anhängare av samma tankegångar som

t.ex. Margaret Mead. Eftersom Ni inom Esperantoförbundet upplever detta som negativt, kan jag endast beklaga och hoppas att det skall vara möjligt för mig att i något senare sammanhang korrigera det missvisande intryck, som kan ha givits i min rapport, om också oavsiktligt från min sida.

Om jag uppfattar saken rätt, vill Esperantoförbundet som det främsta kravet på sitt program föra fram språkens likställighet. Denna likställighet skall då uppnås genom att ett gemensamt internationellt språk införes, parallellt med de olika, nationella språken. Om en utanförstående tillåts komma med en kommentar, vore det viktigt för att undvika skenet av nykolonialism och kulturimperialism, att det internationella språket inte har för stark anknytning till de västeuropeiska språken. Detta är en synpunkt, som starkt understrukits bl a av den ovannämnda Margaret Mead. I det sammanhanget är det möjligen olyckligt med en alltför stark «naturalistisk» inriktning och beroende av västeuropeiska språk hos planspråket, sådan som i occidental, interlingua och möjligen också esperanto. (Jag hämtar mina upplysningar om språken från Bagger, Plansprogstanken - idé och historia, sid. 9)

Slutligen kan jag tyvärr inte instämma i Esperantoförbundets bedömning av den framtida utvecklingen. Som jag ser det och som jag framställt det i min rapport, kommer den framtida utvecklingen på det språkliga området att präglas av två delvis motstridiga trender. För det första finns det då en tendens till förstärkning av engelskans och i mindre utsträckning andra västeuropeiska språks redan tidigare starka ställning genom dominansförhållandena inom olika masskommunikationer. Det finns emellertid också en tendens till reaktion mot denna utveckling och ett krav på «språklig jämlikhet» i olika delar av världen. Som jag bedömer utvecklingen, är det emellertid sannolikt, att denna strävan efter språkligt likaberättigande kommer att ta sig uttryck i ett hävdande av de egna nationella språkens ställning och rättigheter.

Även om jag alltså är skeptisk beträffande den framtida utvecklingen för olika planspråk, förefaller det mig i flera avseenden vara önskvärt med ett gemensamt internationellt språk i framtiden, vilket inte är förknippat med tidigare kulturella dominansförhållanden och känner ur den synpunkten sympati för Era strävanden».

Rune Johansson

Sveda jarkongreso en pentekosta Falköping

Je pentekosto, dum la vere lastaj tagoj de majo ĉi jare, la svedaj esperantistoj kolektiĝos por jarkongreso en Falköping, unu el la plej malnovaj urboj de Svedio.

Jam pluraj jarkongresoj okazis en norda Vestrogotio, en Skövde kaj en Lidköping, sed laŭ nia scio neniu en Falköping. Tiu fakto estas despli rimarkinda, ĉar la esperantoklubo de Falköping ekzistas jam de pli ol kvardek jaroj, kaj ĝi estas unu el la plej stabilaj esperantokluboj de Svedio. Povas esti, ke ĝi ne brilis per grandaj aranĝoj kaj venkoj, sed la esperantistoj de Falköping obstine kaj persiste laboris tra la jaroj, kaj ili sukcesis trovi ankaŭ novajn, junajn adeptojn.

La urbo Falköping situas en la koro de tre malnova kultura regiono, Falbygden. Tien venis la homoj jam en la nebula prahistoria tempo. Ili sekvis la valon de la rivero Ätran ĝis la fekunda regiono, kiu estas hodiaŭ vasta ebena inter la du montoj Mösseberg kaj Älleberg kaj la arbariĉa monta regiono, kiu estas la plej norda parto de la montetaro de la provinco Småland.

Jam antaŭ kvarmil jaroj vivis ĉi tie terkulturistoj, kaj ili konstruis la famajn ŝtonajn tombojn de Kareby, absoluta unikaĵo por Svedio. Sed eĉ meze en Falköping mem, ĉe la parko de la muzeo, troviĝas tombo el la ŝtonepoko. Kiu alia urbo povas fieri pri tia unikaĵo?

Falköping situas tuj ĉe la piedo de Mösseberg, kaj el la restoracio Bredablick sur la monto oni havas grandiozan panoramon de la urbo kaj de la ebena. La libertempa regiono sur Mösseberg, kiun aranĝis la urbo, estas unu el la plej belaj kaj bonaj de Svedio; eĉ ĉarmaj lagoj, kie oni povas naĝi, troviĝas tie. Fama estas la sanatorio de Mösseberg, ekskluziva kuraĉloko, kie multaj konataj personoj pasigis periodojn de siaj vivoj. Tuj proksime troviĝas la malsanulejo de Falbygden, unu el la plej modernaj kuracejoj por nervmalsanoj de Svedio.

Kiam la fama esploristo Carl von Linné vizitis Falköping en la 18-a jarcento, ĝi estis ankoraŭ sufiĉe negrava loko. Li diras, ke la urbo estas «largá 200 paŝojn kaj longa 400». Sed en la 19-a jarcento venis la fervojo. Kiel la civitanoj de multaj urboj ankaŭ la falköpinganoj konsideris la fervojon ion malbonan, kiu forprenos de ili komercajn favorojn. Tial ili ne permesis, ke la fervojo estu konstruata ĉe la urbo mem, sed nur je kelka distanco. Tial oni lokigis la fervojan stacion ĉe Ranten eks-

ter la urbo.

Inter la urbo Falköping kaj la fervoja stacio Ranten kondukis vojo kiu post pluvoj fariĝis ege malpura. Anekdotoj rakontas, ke en la komenco de nia jarcento redaktoro de la loka gazeto *Falköpings Tidning* vizitis Romon kaj partoprenis akcepton ĉe la papo. Hejmenveninta li renkontis la parohestron, kiu ŝerce demandis: «Nu, kion diris la papo?» «Ho, li nur demandis, ĉu la vojo al Ranten estas ankoraŭ same malpura!»

La vojo de Ranten estas hodiaŭ, parte, la strato de Sankt Olof, ĉefstrato ligita de multaj ĉarmaj lignaj domoj, kaj same pura kiel estas kutime la ĉefstratoj de urboj, kaj la fervoja stacio de Ranten estas hodiaŭ la centra fervoja stacio de Falköping.


Neniu regiono en nia lando havis dum la mezepoko tiom da preĝejoj kiel Falbygden. Oni konstruis preĝejon ĉe preskaŭ ĉiu eta vilaĝo. Tuj norde troviĝas tri preĝejoj tre proksimaj unu al la aliaj. La legendo diras, ke tri fratinoj grandbienaj tiom malamikiĝis, ke ili eĉ ne povis viziti la komunan preĝejon, sed ĉiu el ili konstruigis por si apartan preĝejon. Multaj el tiuj malnovaj preĝejoj ankoraŭ ekzistas. Fama estas la ronda preĝejo de Skörtorp, kaj en Kungslena, kie okazos la esperanta diservo, troviĝas pluraj memoroj el la tempo, kiam ni svedoj ankoraŭ interbatalis kun la danoj.

Falköping situas ĉe grava nord-suda ĉefvojo, kaj pluraj gravaj historiaj bataloj okazis en tuja proksimeco. Hodiaŭ la fervoja linio Stokholmo-Gotenburgo pasas la urbon, kaj per la linio Falköping-Nässjö la urbo estas ligita al la orienta ĉeffervojo Stokholmo-Malmö. Sekve Falköping situas tre centre kaj estas facile atingebla, ĉu per fervojo, ĉu per aŭtomobilo.

La moderna Falköping havas gravajn industriojn diversspecajn kaj ĝi estas ankaŭ centro por la terkultura ĉirkaŭaĵo. Luksa kaj impona estas la Civitana Domo, konstruita antaŭ nur kelkaj jaroj, kaj ĉirkaŭ la malnova urbocentro kreskas modernaj loĝkvartaloj.

Mi ne povas imagi al mi pli idealan lokon por la jarkongreso de SEF ol tiun ĉarman urbon Falköping, nek mi povas imagi pli idealan sezonon ĝin viziti ol ĝuste je pentekosto, fine de majo, je la transiro de printempo al ĉarma frusomero. Venu al Falköping — mi garantias, ke vi neniam pentos.

Åke Blomberg



NYFIKEN PÅ ANDRA?

Vill du veta vad esperantisterna i våra grannländer och annanstans i Europa har för sig? Prenumerera på deras tidningar! Dessa till exempel:

Brita Esperantisto	27 skr
Ĥho (dansk)	25 skr
Eŭropa Esperanto-Revuo (förut Germana E-Revuo)	28 skr
Norvega Esperantisto	15 skr

Esperantoförlaget

NYA BOKFÖRSLAG

VENTOJ

modern prisbelönt jugoslavisk roman av Blagoje Ivanov, översatt av Josip Velebit.

Vojdan, romanens huvudperson, drar sig tillbaka till ensamhet i bergen för att komma till klarhet om sig själv och sitt förhållande till medmänniskorna... **Pris 19 skr**

FORKAPTITA

R L Stevensons välkända äventyrsroman från Skottland på 1700-talet. Översatt av A. Goodheir. **Pris 30:50**

KALEVIPOEG

delar av det stora estniska eposet om Kalevipoeg, hjälten i gamla estniska folksagor. Översatt av Hilda Dresen, illustrerad av O. Kallis

Pris 12 skr

Esperantoförlaget

1976: Esperanto i massmedierna

Fyra händelser under 1976 gav esperanto publicitet i massmedierna. Kongressen för järnvägsmännen internationella esperantoförbund i Skellefteå och SAT-kongressen i Göteborg var de två punkter som kunnat förutses, och där arrangörerna också ägnat ordentlig uppmärksamhet åt att hålla pressen informerad. Den tredje händelsen var egentligen ingen händelse, utan mer ett tillfälle att falla in i debatten, där man ifrågasatte om det är nödvändigt att statsministern i Sverige är bra på engelska. Den fjärde händelsen gällde en kort intervju i teve, som kort refererades i pressen dagen efter.

Järnvägsmännen

Tidskriften *SJ-nytt* (nr 13/14) gav den fylligaste informationen på ett uppslag med rubriken «Språkförbrödring för 600 järnvägare».

«Det kramades och vänslades på stationen. Nu skulle de träffas igen för att umgås, titta på Skellefteå och Norrland och förstås prata esperanto.

Alla kan esperanto, många är järnvägsmän, det var fruarnas och barn med också. Så visst har de mycket gemensamt. Varje år hålls en kongress för järnvägsmän som talar detta världens-runt-språk. Men det var första gången en kongress hölls så långt norrut i världen».

Lokalpressen, *Norra Västerbotten* och *Västerbottens Folkblad*, rapporterade, liksom den betydligt mycket sydligare *Söderhamn-Hälsinge-Kuriren*. Radioprogrammet *Det ska vi fira* spelade marschen 'Vivu esperanto'.

SAT i Göteborg

Om SAT-kongressen i Göteborg skrev *Göteborgs-Posten* och tidningen *Arbetets* västsvenska upplaga. I *Aftonbladet* (26 juli) kunde man också hitta en spalt med vinjetten 'Hur gick det sen'.

«...för esperanto, det konstgjorda språket som skulle ena världen?»

Sedan 1800-talets slut har ett 100-tal nya världsspråk presenterats. Esperanto är det som klarat sig bäst. Idag används språket av mellan 1 och 2 miljoner människor i ett 90-tal länder. Men endast ett par hun-

dra tusen är aktiva. Världsspråket utvecklades snart till en världsrörelse».

Statsministern och språket

En insändare i tidningen *Land* (nr 41, 8 okt) av Gunnar Söderberg bemötte kritiken mot statsminister Fälldin för bristande språkkunskaper och pläderade för esperanto. Detsamma gjorde Geoffrey Sutton i ett 'brev till chefredaktören' i tidningen *Arbetet* (6 okt):

«För jämlikhetens skull vill jag göra en anmärkning beträffande Ingeborg Lundgrens brev i *Arbetet* den 26 september. Hon skriver, att Sverige nu har fått 'en statsminister som inte ens kan engelska. Vilken PR för Sverige!' Visst är det en stor merit att kunna ett främmande språk, men Sveriges koncentration på världens starkaste språk är ingen 'PR för Sverige'.

En svensk statsminister som gör PR för engelska gör PR också för uppdelningen av världen i privilegierade och missgynnade kulturområden, där de missgynnade nationerna ska lära de privilegierades språk och de privilegierade kan syssla med något mera produktivt».

Tio minuter i teve

Einar Dahl, f.d. riksdagsman och kändis i Västsvet, intervjuades en kort stund i teveprogrammet *Sveriges Magasin* (27 sept) tillsammans med Märtha Andréasson. Inslaget kommenterades kort i bl a *Örebro Kuriren* och *Nerikes Allehanda*. I *Göteborgs-Posten* (28 sep) löd kommentaren:

«Esperanto blev aldrig det världsspråk entusiasterna tänkt sig. Det må vara aldrig så lätt att lära. Dessa erfarenheter förmedlade Einar Dahl, riksdagsman, artist och en esperantokämpa som aldrig ger tappt».

Facket, religionen, kulturen

Signaturen 'rand' i *Fabriksarbetaren* (nr 4) skriver under vinjetten 'som sagt va' om sina minnen som esperantist. Och det gör han med anledning av en motion.

«Nästan med rörelse ser jag att motionsfloden till kongressen bland alla realbetonade förslag också innehåller ett om att förbundet ska ställa sig bakom kravet att införa esperanto som

internationellt fackligt hjälpspråk».

Från en helt annan utgångspunkt togs esperanto upp av tidningen *Dagen* (27 april), under rubriken 'Nu behövs förbedjare för IBRA:s esperanto-program'.

En rapport från Sekretariatet för framtidsstudier, 'Kulturella beroenden', nämnde esperanto på några rader, och Esperantoförbundets svar har redan rapporterats i *La Espero*.

Kollektivbok av storfamiljen Vita Hästen (Författarförlaget), under redaktion av Jarl Hammarberg-Åkesson, tar upp esperanto vid flera tillfällen, bland annat med ett litet textavsnitt på esperanto, som börjar:

«En tiu ĉi domo loĝas kvar viroj, kvin virinoj kaj tri infanoj. Unu de la virinoj estas Lillemor. 'Lillemor' signifas 'Patrineto'».

En liten och en stor

En liten notis i *Västerbotten-Kuriren* föranledde en lika liten notis i *Expressen* (27 juni):

«På Hawaii är esperanto obligatoriskt i skolorna, berättar Västerbotten-Kuriren.

Det börjar klarna hur det svenska kungaparet har tänkt att lösa sina inbördes språkpro-

blem».

En stor artikel i tidningen *Norden* med rubrik 'Ensidighet i språkundervisningen' (av Geoffrey Sutton), där språkundervisningen i olika nordiska länder diskuteras och experiment med undervisning i esperanto refereras.

Lokala tidningar

I flera hörn av landet finns esperantoföreningar som har god kontakt med den lokala pressen. Som representant för det ca 60-tal övriga klipp av större eller mindre format kan väl tjäna inledningen till en artikel i *Västmanlands Läns Tidning* (5 maj) med rubrik 'Esperanto som världsspråk: Internationell träff 8—9 maj på Lövudden':

«Utbildningsminister Bertil Zachrisson har uttryckt lämpligheten av att varje svensk skall vara tvåspråkig. Samtidigt förslår han engelska som andra språk.

Den senare uppfattningen delas inte av bl a medlemmarna i Västerås Esperantoklubb. På ett stort internationellt möte på Lövudden i Västerås 8—9 maj ämnar man också diskutera möjligheterna att kunna få esperanto som andra språk».

Ulla Luin

UK 77

Island

Kongressavgifter

1. Icke medlem i UEA	310 skr
2. Medlem med årsbok	276 skr
3. Medlem med årsbok och «esperanto»	225 skr
4. Make/maka till (1)	218 skr
5. Make/maka till (2) eller (3)	194 skr
6. Ungdom t o m 20 år	94 skr
7. Universitetsstuderande t o m 30 år	155 skr
8. Synskadad	125 skr

(Gäller till 31 mars 1977)

Upplysningar hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 d, 217 53 Malmö.

Kelkaj raportetoj pri klubaj agado

Vintra festo en Gotenburgo

En decembro la Esperanto-Alianco de Gotenburgo okazigis vintran feston. La kulturorganizo «Balkan» prezentis popoldancojn, kantojn kaj muzikon de diversaj jugoslaviaj respublikoj. Buntaj popolvestoj de 12 gedancantoj, ĉiuj junaj, eĉ unu nur 5-jara etulino, estis ĉarmo por la okuloj. Kvin muzikistoj bele ludis viglajn melodiojn. Oni povis ankaŭ aŭskulti ekzotikan instrumenton el Albanio, nur du-kordan.

Folke Rosén el Stockholmo rakontis pri siaj travivaĵoj per esperanto.

Leterpapero el Västerås

En dek lingvoj estas presitaj kovertoj kaj leterpaperoj, kiujn la klubo de Västerås presigis. La jena frazo aperas sur ili:

*Kontraŭ diskriminacio
Kontraŭ lingva diskriminacio
Uzu internacie neŭtralan lingvon
Uzu la internacian lingvon esperanto*

La Esperantoklubo de Västerås ankaŭ vendas tiun ĉi materialon. Eblas mendi ĝin ĝire (pĉk 88 43 12-0) en kvantoj de 50 p. A4 leterpaperoj kaj 25 p. C5 kovertoj por kune 6,50 skr. Por la duobla kvanto la prezo estas

12,— skr, kaj ekster Skandinavio iom pli alta.

VEK ankaŭ eldonis malgrandan dupaĝan folion kiel varbilon pri si mem, kun ilustraĵoj, mallonga argumentado por esperanto, kelkaj vortoj pri la klubo kaj kelkaj kontaktadreso kaj telefonnumeroj.

Poezio de Zamenhof

La kluboj de Stokholmo havis viziton de profesoro Carl Støp-Bowitz dum sia lasta kunveno de 1976.

Profesoro Støp-Bowitz prelegis pri la poezio de Zamenhof kaj voĉlegis kelkajn poemojn.

La programon kompletigis Maud Pelz per kantataj poemoj, Franko Luin per voĉlego el la infanlibro *Winnie-la-Pu* kaj Sven Alexandersson per mallonga prezento de libroj.



Maud Pelz pliriĝis la programon per kelkaj kantoj.

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



YTONG AB

YXHULT GRUPPEN

La larmoj de la krokodilo

Ĉiuj scias, ke la krokodilo ploras, kiam ĝi manĝas. Sed kial ĝi faras tion?

La scienco diras, ke la krokodilo ploras, kiam ĝi manĝas, kaj aldonas, ke al la nomita besto, pro la premo de la manĝo al kelkaj muskoloj, venas larmoj en la okulojn. Tiu ĉi klarigo per la premo sur iajn muskolojn estas entute erara. La vero estas jena:

Filmentrepreno invitis iun tagon krokodilon kunlabori en granda filma spektaklo. La krokodilo ĝis tiu tago trankvile vivis en rivero kaj entute ne sciis, ke ekzistas en la mondo tiaj stultaj kiel filmo. Ĝi tamen kunsentis kunlabori, ĉar ĝi eksciis, ke kiel filmaktoro ĝi ricevas bonan salajron.

Ĝia tasko ne estis malfacila — ĝi devus fari tion, kion ĝi kutimis fari sian tutan vivon: ĝi devus nome ludi sin mem en la momento, kiam ĝi manĝas dikan afrikan esploriston. Sed ĉio ne iris tiel glate, kiel la filmuloj kaj la krokodilo deziris. En la scenario estis skribite, ke ĝi devas manĝi la esploriston kune kun la vestaĵoj kaj la kasko. La krokodilo klopodis fari tion, sed ĝi flankenglutis kaj la ĉefaktoro devis longe frapi ĝin sur la dorso.

«Mi ja diris, ke mia organismo ne toleras tropikajn kaskojn», ekspiris la krokodilo tusante. La reĝisoro jam kutimiĝis al la kapricemo de filmaj stuloj kaj forstrekis el la scenario la tropikan kaskon. Oni trovis alian afrikan esploriston — la unua ne plu estis utiligebla, ĉar li estis sen kapo — sed la dua estis tro dika. La krokodilo formordis la kruron, poste ĝi turnis lin kaj komencis ĉe la kapo.


«Haltu!» ekkriis la reĝisoro. «Ne turnu lin!»

Oni refaris la scenon kun nova esploristo kaj forstrekis el la scenario la vorton 'dika'. Denove okazis malfacilaĵoj, tiel ke la sceno estis sukcesa nur je la deka ripeto. Pro la malfacila rolo oni pagis al la krokodilo kvincent mil kronojn. Krom tio ĝi, kiel sola heredanto, ricevis honorarion ankaŭ por sia avino, kiu ludis en la filmo en la rolo de virina mansaketo.

Ĝi havis kvincent okdek mil kronojn, kaj ĉion rapide foruzis — ĉefe por virinoj kaj drinkado, sed ĝi aĉetis ankaŭ sportan aŭtomobilon kaj somerdomon. Ĝi vivis feliĉe kaj kontente ĝis kiam venis la alvoko, ke ĝi anoncu siajn enspezojn al la imposta oficejo. Ĝi estis

POR FINI

«Por fini» estas ankoraŭ unu nova rubriko en *La Espero*. Vi trovos ĝin jen kaj jen en la gazeto kun amuzaj kontribuoj. La historio pri la krokodilo jam aperis en *Kvinpinto* antaŭ kelkaj jaroj. «Paul» estas esperantisto kaj vi renkontos lin regule en la gazeto. Pli frue li kunlaboris en *La Praktiko*.




stulta kaj malkaŝis la tutan sumon, kiun ĝi enspezis, kaj je tio fiere ridetis.

Poste ĝi ne plu ridetis — ĝi ricevis tian ordonon: «Viaj enspezoj sumiĝas je 580 000 kronoj, kio estas ekzakte 500 mil super la normalo. La imposto je tio estas 355 000 (per vortoj ... ktp). Pagenda ĝis ... ktp». De la tuta salajro restis al ĝi ne pli ol 225 000 kronoj. Vi kom-

prenas, ke tio okazis antaŭ tre longe, antaŭ la tempo de la 102%.

Malfeliĉega ĝi sub kosto vendis la aŭtomobilon kaj la somerdomon. Ĝi pagis la impostajn ŝuldojn kaj nun estas malriĉulo.

Lastfoje mi renkontis ĝin antaŭ la poŝto. Ĝi sidis tere kaj milde petis min: «Sinjoro, ĉu vi povus donaci al mi peceton



- Ne lasu vin ĝeni: sed memoru, ke ĉiu kiso mallongigas vian vivon.

de via kruro? Jam tri tagojn mi ne manĝis».

Mi kompatis ĝin, pro tio mi donis al ĝi la tutan kruron — mi ne bezonas ĝin plu, ĉar mi havas aŭtomobilon.

Mi rigardis la kompatindan krokodilon dum ĝi manĝis kaj mi rimarkis, kiel malĝojaj larmoj ekglitis el ĝiaj okuloj. Ĝi memoris, kiel ĝi manĝis afrikajn esploristojn en la filmo, kiel ĝi ekkonis riĉecon kaj kiel ĝi denove malriĉiĝis.

Neniu krokodilo iam forgesos la maljustaĵon, kiun ĝia antaŭulo devis suferi. Ĉiam, kiam ĝi ricevas ion por manĝi, ĝi malĝoje esploras kaj preparas venĝon.

Mi esperas, ke nun estos klare, kial la krokodiloj ploras ĉe la manĝoj, kaj espereble vi ankaŭ povos kompreni la diron, ke iu ploras 'krokodilajn larmojn'. M*

Kelkaj anekdotoj

En trajnkupeo sinjorino subite donis sian krizantan fileton al la plej proksima sinjoro.

— Sed kio estas ĉi tio?

— Ho, vi estas la sola, kiu surhavas pluvmantelon, kaj mi devas iri al la restoracia vagono.

Komercisto Jansson ĉiam havas teruran malordon sur sia skribotablo en la firmao. Fakturoj, leteroj, broŝuroj kaj multe da aliaj paperaĵoj amasiĝas tie en lia eta oficejo.

Unu tagon okazis la katastrofo. Li alvokis sian kurknabon.

— Ĉi tie estas 25 oeroj. Kuru al la plej proksima telefonkiosko kaj telefonu ĉi tien. Mi ne scias, kie estas mia telefono!

— Ĉu vi estas tute freneza? kiris la direktoro de la asekura kompanio. Kiel vi povas asekurigi viron, kies aĝo estas 104 jaroj?

— Sed, respondis la agento, laŭ la statistiko tre malmultaj mortas je tiu aĝo!

— Eĥ, diris la kamparano. Ni tute ne bezonas instruktorojn por elkalkuli, kiel oni planu novan vojon. Ni ellasas ŝafon sur la kampon, poste ĝi mem trovas la plej bonan vojon hejmen.

— Sed se vi ne havas ŝafon?

— Tiam kompreneble ni alvokos inĝenieron.